



# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno

En cas de non-distribution, renvoyer à

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)

## Editeur responsable

Responsa eldonanto +

Informoj en la franca lingvo:

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,

BE-4800 VERVIERS

## Informatie in het Nederlands

Informoj en la nederlanda:

Tel. Xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

## Informationen auf deutsch

Informoj en la germana:

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Informilo aperanta kvarfoje en jaro.

**Jara abono / allgxo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB

Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,

BE-4800 VERVIERS

## Nederlando :

ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi

provizore bonvolu uzi alian konton.

**Germanio** : konto 6623201,

Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)

Im Pesch 20

DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aux januaro).

La kotizintaj membroj principe gxuas rabaton okaze de aligxo al Trilanda Renkontigxo organizita de *Senlime*.

# Trilanda renkontigxo

## Senlime

invitas vin al

## Trilanda Renkontigxo en Blegny-Minejo

Dimancxon, la 10an de oktobro 2004.

## Programo :

09h15 Aŭtobusa foriro de Blegny-Minejo al Liege-Coronmeuse

10h00 Enŝipigxo sur la boato « Pays de Liège » al Visé  
(trapaso de kluzo en Monsin)

11h30 Visé-Blegny tra la kamparo per aŭtovoja trajneto

12h00 Tagmangxo en la grupa restoracio de Blegny-Minejo :  
viandbulo-frititaj terpomoj + folikuko je pomoj el Aubel

13h30 Vizito de la minejo :

vera subtera galerio + surfacaj teknikajxoj

15h30 Mangxeto (peco da riza torto + kafo) kaj disigxo.

**Prezo : 30 EUR** – trinkajxoj neenkalkulitaj krom la fina kafo.

Kutima rabato da 20 % nur por

- kotizintaj (antaux 2004/06/30) membroj de **Senlime**

- infanoj kaj junuloj < 26 jaragxaj.

## Bonvenon al cxiuj !

Sed... atente legu la detalojn interne :

- Deviga rezervado kaj pago **antaux la 2004/09/25**
- Grupa prezo postulas saman programon (mangxo,...) por cxiuj
- Necesas dufoje malsupreniri sxtuparojn (gxis 60 m. suben)
- La vizito do neblas por rulsegxantoj
- Akompanaj bestoj malpermesataj
- Vesto kaj kasko estos pruntedonitaj al cxiu
- Temperaturo en la mineja galerio : proksimume 15°.

## *Trilanda : travivu la heredon de la « Nigraj fauxkuloj »*

### **Sxip-krozadeto**

La rendevuo, por tiu-cxi promesplena tago, estas en la parkejo de la karbminejo en Blegny. De tie, aŭtobuso facile kondukos nin al la ensxipigxejo de Coronmeuse (se vi ne disponas pri aŭtomobilo, vi eventuale povus rekte atendi nin tie).

Ni tamen insite petas, ke vi neniam malfruŭ : nek la aŭtobuso nek la boato rajtas atendi vin (pensu pri la aliaj pasagxeroj).



Trankvile la sxipo lauxflue sekvas la riveregon Mozo tra la Liegxa haveno al la urbeto Visé [Vize]. Survoje vi ne nur gxuos belegan pejzagxon kaj fresxan aeron, sed havos la okazon trapasi kluzon apud la baragxo en Monsin (malofte sxipturistoj havas tiun eblecon kaze de mallonga vojaĝo).

### **Trajnetado**

Ek de Visé [Vize], per simpatia aŭtovoja trajneto, malkovru la cxarmajn fruktogxardenojn de la Malsupera Mozo kaj la restajxojn de la prestigxa pasinteco de la malnova urbo Dalhem.

Lasu vin invadi de la kvieto kaj belo de la kampara pejzagxo.

Fine gxuu esceptan vidon al la karbminejo de Blegny kaj la cxirkauxanta kamparo.

### **Vizito de la minejo**



### **« Necesas malsupreniri por kompreni ! »**

Atinginte la celon, vi agrable kvankam modeste tagmangxos en la grupa restoracio, atendante la plej gravan momenton de la tago : la enmergigxon en la teran subgrundon.

Ne timu : sxtuparoj lasos vin malsupreniri je via ritmo, sen la sxokoj, premoj kaj varmo kiujn devis toleri siaepoke la kuragxaj ministoj.

Se vi havos sxancon, unu el tiuj-cxi mem gvidos vin sur la lokoj kie sxvitis li kaj liaj kamaradoj por perhavigi sian cxiutagan panon. Eble li tiam memoros iun aux alian travivajxon strecxigan el sia junagxo...

La minejo, mondo tiom fascina kaj mistera, kiun ecx tuta vivo ne suficxus por rakonti al vi !

En Blegny, oni montras gxin al vi, en gxia tuta aŭtenteco !

Vi surmetas veston kaj kaskon, kaj malsupreniras en subterajn galeriojn je minus tridek kaj minus sesdek metroj.

Vi malkovras la buvojn, la cxasajxojn, la tajlon, la karbon, la bruon de la masxinoj, la laboron de la homoj ; vi vivas, dauxe de la vizito, la universon samtempe duran kaj pasiigan de la iamaj minkarbistoj [houyeux].

Poste vi sekvas la trairon de la karbo en la tri- kaj lav- instalajxoj gxis gxia transporto. Rulfalilojn, kribriilojn, funelegojn, mincxar-enkagxigajn kaj - elkagxigajn sistemojn, la tutan traktadon de la karbo oni montras al vi, de la alveno de la minajxo gxis gxia vendo kaj gxia transporto.

Nenio sxangxigxis en tiuj konstruajxoj depost ilia fermo, ecx ne la lampoj kiuj konstante lumigas Sanktan Barban, kaj kiujn dauxre gardas la ministoj, spontane.



# ESPERANTO

## Euxregiona kalendaro 2004 (3 + 4)



**Senlime** publikigas kalendaron pri la esperanto-arangxo en la Euxregiono Mozo-Rejno. Gxi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontigoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aux esperanto-grupo en Euxregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en cxiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-cxi agendo eventuale povas enhavi programojn de lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxo (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** principe okazas cxiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, cxiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

**07-16** Somera pauxzo.

**08-20** Somera pauxzo.

**09-17** 19h30 BE-Kelmis  
Select: "Tabuaj vortoj en esperanto" : prezento de libro far' Marcel **Delforge** kaj grupa debato pri tiu temo.

**10-10** 9h30 BE-Blegny-Minejo: (Liegx), Trilanda renkontigxo.

**10-15** Pauxzo (pro la TI.R. ni escepte **NE** kunvenos en Kelmis).

**11-19** 19h30 BE-Kelmis,  
Select: Klaus **Hogen** revigos nin per "**Kasteloj**".

**12/12** 11h30 BE-Kelmis,  
Select: tradicia Zamenhof-festo (detaloj en nia kvara numero).



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos en 2005, je la 19h30, la: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15, 05-20** kaj **06-17**.

**07-16** Pause d'été.

**08-20** Pause d'été.

**09-17** 19h30 BE-Kelmis  
Select: "Mots tabous en espéranto" : presentation du libre par Marcel **Delforge** et débat de groupe sur ce thème.

**10-10** 9h30 BE-Blegny-Mine: (Liège), Rencontre des (espérantistes des) Trois Pays (BE-DE-NL).

**10-15** Pause (suite à la TI.R., exceptionnellement, nous **NE** nous réunirons **PAS** à La Calamine).

**11-19** 19h30 BE-Kelmis,  
Select: Klaus **Hogen** nous fera rêver avec des "**Châteaux**".

**12/12** 11h30 BE-Kelmis,  
Select: traditionnelle fête Zamenhof (détails dans notre quatrième numéro).



Autres réunions à BE-Kelmis, au Select, en 2005, à 19h30, les: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15, 05-20** et **06-17**.



Nepre partoprenu nian oktobran trilandan renkontigon en

## BLEGNY-MINEjo

Atente legu cxi-sube cxiujn utilajn informojn.

### Pri la intereso kaj prezo

Cxiam troviĝas inter esperantistoj iuj, kiuj opinias ke la postulita prezo estas tro alta, aux ke la arangxo ne estas suficxe «esperantista».

Kial mi partoprenus tian aferon, se mi povos mem, samkoste aux ecx pli malmultekoste, fari tion per miaj propraj rimedoj kaj mia propra lingvo... ?

Fakte, bonvolu memori ke jam de pli ol dek jaroj, multaj spertas « psikologian » sojlon kaj opinias ke pli ol 1000 BEF (25 EUR) por unutaga arangxo estas tro. Tamen cxiuj scias ke, dum dek jaroj ekzemple, la prezoj suficxe kreskas. Estas certe ke tio kio kostis 25 EUR en 1994 nun kostas 30 EUR aux pli. Ankaux esperantistoj ne povas fari miraklojn !

Pri tiu-cxi tago, tute ne eblas al vi fari tion mem : la sxipo veturas nur por grupo da minimume 40 personoj (kaj necesas antaux-rezervi !). La trajneto ankaux kutime ne veturas inter Visé kaj Blegny... Krome, sen speciala arangxo, la minejaj vizitoj okazas alternative en la franca kaj en la nederlanda lingvo. Ankaux necesas antauxrezervi por la germana aux alia lingvo !

Fine, tiu-cxi bela ekskurso (preskaux lerneja !) ankaux tre taugas por viaj infanoj (kaj eble amikoj), ecx se ili ne parolas esperanton – precipe se ili komprenas la francan, lingvo per kiu nia gvidisto akompanos nin (ni tradukos cxion, cxu papere, cxu surloke dum la vizito). Jen ankaux bona okazo por rimarkigi esperantistojn en loko kiu estis (versxajne ankoraux estas) la unua turisma allogaĵo en la Liegxa provinco !

Estas ankaux notinde ke malofte boato trapasas kluzon kun pasagxeroj cxar tio estas tro temporaba...

Jen niaopinie kelkaj bonaj kialoj por nepre pasigi tiun tagon kune !

Jam hodiaux sendu vian aligxilon kaj vian kontribuon...

### ***Koran inviton al cxiuj !***

### Situo



### Aliro

Ni ege konsilas la alvenon per aŭtomobila (kun)veturado : la celon vi plej facile atingos prunteprenante la aŭtovojojn E40 (Köln-Bruselo) gxis la elirejo 36, aux la aŭtovojojn E25 (Maastricht-Lieĝo) gxis la elirejo 2. Tiam simple sekvu la vojindikilojn.

Se vi tro malfrue atingus la minejon, klopodu gxustatempe atingi la ensxipigxejon en CoronMeuse per la aŭtovojo E25 (lasta eliro antaux Lieĝo – sekvu la vojindikilojn «Halle des foires»).

La trajna alveno gxis Blegny tute ne eblos, dimancxe ecx ne per aŭtobuso. Tamen eblas gxustatempe atingi la ensxipigxejon en CoronMeuse per la aŭtobuso n°1, ek de la stacidomo «Guillemins» aux de la stacidomo «Palaco» [Palais] plej malfrue laux jena horaro : Guillemins 9h14 – St-Lambert (Palaco) 9h26 – CoronMeuse 9h37 (atentu ke cxie necesas iom marsxi !).

Reveno eblos, de Blegny-Minejo (17h03) al Lieĝo-palaco (17h55) per la linio 67 (en Lieĝo, aŭtobuso n°1 veturas cxiujn 20 minutojn).

### Gravaj atentigoj

Nek la buso, nek la boato, nek la trajneto rajtas atendigi la aliajn pasagxerojn por vi, ecx se vi mem ne kulpas pro eventala malfruo : akurateco absolute nepras.

Aligxo postulas antauxan pagon cxar absolute necesis anonci la nombron da partoprenantoj. Nenia repago aux lastminuta rabato pro ia ajn kialo eblos. Grupa prezo, laux la regularo de Blegny-minejo, postulas saman horaron, saman mangxon, k.t.p. por cxiuj (krome Senlime devis rezervi por 40 personoj kaj se ne estos tiom, tamen devos pagi la plenan prezon : ni certe jam riskas financon perdon en la afero - dankon pro via komprenemo).

Memoru ke la sxtuparoj en la minejo ne permesas aliron de segxurlantoj kaj ke la akompanaj bestoj ne estas permesataj. Funde de la galerioj, la temperaturo estas proksimume 15 gradoj. Kaj precipe, la temperaturo matene sur la boato kaj en la trajneto jam povas esti tre malalta je tiu dato : kunprenu bonan lanaxon !

# Aligxilo al Trilanda Renkontigxo Blegny 2004/10/10

Cxiu aligxanto nepre kompletigu apartan dokumenton (aux fotokopion) kaj alvenigu gxin antaux la 25an de septembro cxe Jean-Marie Jacques, 5 rue Wauters, BE-4800 VERVIERS, ☎ (xx-0)87/33.02.92.  
Forstreku la nevalidajn menciojn kaj krucumu la elektitajn alternativojn.

S-ro/S-ino/F-ino:

Naskigxdato:

familia nomo (por alfabeta ordigo)

jaro monato tago

antauxnomo aux persona nomo

Adreso:

strato kaj numero

landa / urba kodoj

urbo

tel. n-ro (kun zona prefikso)

faks. n-ro (kun zona prefikso).

e-adreso :

 @ 

- legis, komprenis kaj aprobas la invit-kondicxojn<sup>(1)</sup> de **Senlime**,
- aligxas al la **Trilanda Renkontigxo** en Blegny-minejo, la 10an de oktobro 2004 kaj do **hodiaux** antauxpagas la devigan kaj nerepageblan aligx-kotizon da :

30,00 EUR

24 EUR pro rabato (20 %)

Al la konto 000-0245571-64 de Esperanto-Grupo, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS  
IBAN: BE29 0000 2455 7164 BIC: BPOTBEB1

Al la konto de Senlime: 6623201, Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000).

**Rabaton** da 20% (6 EUR) gxuas **NUR** junuloj (<26 j.) kaj  
(antaux la 30a de junio 2004) kotizintaj membroj de "Senlime".

- deziras ricevi vian trimonatan informilon « **Senlime** »:  
per ordinara **posxta** sendo, surpapere (membrigxo tiam deviga)  
ene de la revuo de **APE/Liege-Esperanto** («Inter ni», kiun mi abonas)  
per legado/telesxargo el la **retaj** pagxoj de **Senlime** (<http://www.senlime.org>)  
per mia propra sistemo («Senlime» **NE** estu sendita al mi persone).

N-B: estas notinde, ke **Senlime** mem ne praktikas grupajn sendajxojn aux similajn sistemojn.

Dato:

jaro monato tago

Subskribo:

**(1)** La aligx-kondicxoj estas detale priskribitaj en la n-ro 2004-3 de la informilo de **Senlime**

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupa

## Multilinguisme ou espéranto ?

Comme il arrive de plus en plus souvent, suite à un article paru dans LE VIF / L'EXPRESS du 16 avril, un débat entre lecteurs nous a valu d'y lire trois articles des plus intéressants (donc aussi publiés sur le «blog» de notre site internet)...

## D'Harcour contre Pierroux et Pirlot

### Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob  
18 Petit Jonckeu  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: R. Demarche  
22 Rue Donckier  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/22.68.18

Secrétaire: J.-M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association  
pour l'Espéranto (A.P.E.)  
M. Delforge  
16 Rue des Glacières  
6001 MARCINELLE

### Cotisations

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte

n°: 000-0245571-64  
IBAN: BE29 0000 2455 7164  
BIC: BPOTBEB1  
de:

Esperanto Grupo  
22 Rue Donckier  
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de Senlime est restée inchangée depuis sa création, il y a 11 ans.*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 03-04 12 €  
U.E.A. 2004 54 €  
Senlime 2004 10 €

en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année:  
«cotisation de .... pour ....».

### Site internet

<http://www.senlime.org>

### Pour une Europe qui parle anglais

Votre article à propos du multilinguisme (*Le Vif/L'Express du 16 avril*) m'interpelle... mais à propos de la communication entre les Européens. J'en appelle, à la veille de l'élargissement de l'UE à 25 pays et donc à un nombre important de langues différentes, à une mesure basée sur le bon sens et l'efficacité que les pays scandinaves et les Pays-Bas mettent en application depuis longtemps: privilégier d'abord la connaissance (ce qui suppose un enseignement efficace et pragmatique) de l'anglais. (...) D'aucuns se récrieront que l'anglais ferait la part trop belle à nos voisins britanniques, mais si on considère la place de l'anglais dans le monde de l'économie, de la science et même de la culture, on ne peut que conclure à la pertinence d'une Europe qui s'enrichirait, sans perdre les spécificités ni les richesses de ses différentes langues, d'un atout aussi important que celui d'avoir une monnaie unique. Dans le contexte belge, en particulier, il serait sans doute plus facilement admis au sud de la frontière linguistique de se limiter à l'anglais pour communiquer avec nos voisins flamands. Mais «se limiter», dans ce cas-ci, veut dire «obligation de connaître l'anglais». Si on prenait, dès à présent, une telle mesure au niveau de l'UE, dans vingt ans, chacun des futurs Européens qui vont naître à partir de maintenant serait sûr de pouvoir communiquer avec n'importe quel Européen du même âge.

Jean-Clair D'Harcour, Embourg  
LE VIF/L'EXPRESS 30/04/2004

### Pour une Europe qui parle espéranto

L'intervention d'un lecteur (*Le Débat du 30 avril*) proposant l'imposition de l'anglais comme unique langue de communication m'interpelle vivement. Il est certain qu'au lendemain de l'élargissement de l'UE à 25 pays, parlant 20 langues différentes sans compter les multiples langues régionales, il faut privilégier la connaissance de l'espéranto, une langue efficace, qui est simple à apprendre par tous (et pas uniquement par les technocrates, diplomates et autres économistes) mais pas pour autant autiste comme voudraient le faire croire ceux qui ne la connaissent pas. Une telle mesure d'apprentissage ne nécessiterait pas 20 ans comme

prévu pour l'anglais par votre correspondant, mais une (j'ai bien dit une) année à raison de 4 heures de cours par semaine suffirait amplement au niveau de n'importe quelle année scolaire à partir de la 5e primaire... Cette affirmation est prouvée par plusieurs expériences didactiques réalisées dans différents pays (et pas uniquement d'Europe). De cette manière, chacun garde précieusement sa langue natale et la culture propre qui lui est associée sans se soumettre à celle des faiseurs de guerre (USA + GB + Australie: cherchez le point commun!) qui se sont spontanément associés pour «délivrer» l'Irak qui ne les menaçait nullement (cela aussi est prouvé!). En suivant le beau raisonnement de votre correspondant, l'Europe aurait dû depuis belle lurette adopter le dollar comme monnaie unique et pourtant... l'euro fonctionne et ne se porte pas trop mal vis-à-vis de la monnaie US.

Claude Pierroux, Embourg  
LE VIF/L'EXPRESS 07/05/2004

### Hilote linguistique

Permettez-moi un bref commentaire à propos de l'intervention de J.-Cl. D'Harcour en faveur du "tout-anglais" en Europe (*Le Débat des lecteurs du 30 avril*). Il est en effet de notoriété publique que, désormais, toute personne qui ne connaît pas l'anglais n'est plus qu'un hilote culturo-linguistique qu'il faut traiter avec le plus grand mépris. Je trouve donc tout à fait normal que, de plus en plus, on impose cette forme de racisme culturo-linguistique et que l'on donne la préférence aux nouveaux maîtres, les *native English speakers*. Cependant, il n'est pas question de baragouiner l'anglais, mais de le posséder parfaitement, car, de plus en plus, fleurissent les annonces de recrutement qui spécifient clairement que les candidats doivent être *English native speakers* ou *English mother tongue*. Voyez une liste de plus de 700 annonces sur le site [www.lingvo.org/diskriminacio](http://www.lingvo.org/diskriminacio). (...) *The Native English speakers first* semble flirter le parfait amour avec "Les Français d'abord" d'un Le Pen et "De Vlamingen eerst" d'un Vlaams Blok. Je suis sans doute idiot - comme tout hilote linguistique -, mais je ne vois aucune différence entre ces positions.

Germain Pirlot, Ostende  
LE VIF/L'EXPRESS 28/05/2004